



VALENCIO (HISPANUJO)

Direktoro - Administranto: **AUGUSTO JIMENEZ LOIRA**
 Corona, 5, 2.º, VALENCIA

ĈEFREDAKTORO: **VINCENCO INGLADA ORS**
 Capitanía general de Cataluña—BARCELONA

Tiu-ĉi gazeto estas ankaŭ organo de la
 grupoj de Murcio kaj Valencio

LA KORESPONDADON, abonojn kaj ĉiujn informojn pri la gazeto,
 oni adresu al direktoro

5, Corona, 5 - VALENCIA (España)

organon de la hispana societo por la pro-

-pagando de la lingvo internacia

*
*
ĝimnata gazeto,

LA SUNO HISPANA

ORGANO DE LA SOCIEDAD ESPAÑOLA PARA LA PROPAGACIÓN DEL ESPERANTO
SE PUBLICA MENSUALMENTE

KOSTO DE LA ABONO

En Eksterhispanaj landoj: Unu jaro, tri frankoj, kaj unu numero, 0'30 frankoj, pagataj per mono, per kambio, aŭ per poŝtmarkoj, precize Francaj.

En Hispanujo: Unu jaro, tri pesetoj kaj unu numero, 0'30 pesetoj, pagataj per mono, per kambio, aŭ per poŝtmarkoj de korespondado, precize po 5 centimoj.

Oni akceptas la abonojn nur por almenaŭ unu tuta jaro.

La korespondencia, suscripciones, y todos los informes relativos al periódico, dirijanse al director

Corona, 5, VALENCIA (España)

PRECIO DE LA SUSCRIPCION

En el Extranjero: Un año, tres francos y un número, 0'30 francos, en moneda, letra, ó sellos precisamente franceses.

En España: Un año, tres pesetas y un número, 0'30 pesetas, en moneda, letra ó sellos de correspondencia, precisamente de 5 céntimos.

No se admiten suscripciones por menos de un año.

Aukaŭ oni povas aboni tiun-ĉi Gazeton, ĉe sinjoro Paul Fruictier, 27 boulevardo Arago, Parizo, redakcio de «Lingvo Internacia»

kaj ĉe sinjoro Manuel Benavente, bibliotekisto de la Hispana Societo por la propagando de Esperanto.

Sociedad, 14, Murcia.

También se puede hacer la suscripción á este periódico, en casa de Mr. Paul Fruictier, 27, boulevard Arago, París, redacción de «Lingvo Internacia»

y en casa de D. Manuel Benavente, bibliotecario de la Sociedad Española para la propagación del Esperanto.

Sociedad, 14, Murcia.

La dirección de este periódico admite suscripciones á los periódicos *Lingvo Internacia* (véase el anuncio en *Gazetaro Esperantista*) é *Internacia Medicina Revuo*, revista que se publicará en breve y constará de seis cuadernos anuales de 48 páginas, al precio de 7 francos la suscripción anual.

VARIAS OBRAS

EN LAS ESCUELAS PIAS DE VALENCIA

Diccionario Esperanto-Español de raíces, una peseta; Gramática, 0'75; cuadro de palabras correlativas, 0'10; enumeración y significado de los afixos, 0'25; ejercicio de traducción, 0'50.—**Revdo. P. ANTONIO GUINART**

EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA—Sociedad, 14

Se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto de las que se publican en la actualidad, como igualmente de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto, de las que forman la colección aprobada por el Dr. Zamenhof, autor del idioma internacional.—Gramática del Sr. Villanueva, 1'50 ptas., para fuera de Murcia, franco de portes y certificado.—No se sirve ningún encargo que no venga acompañado de su importe en letra del Giro Mutuo, carta-orden, ó sellos de diez y quince céntimos, certificando la carta en este último caso.

JARO I.
N.º 5.ª

LA SUNO HISPANA

Letero de D^{RO} Zamenhof

Adresita al S.^{OR} M. Seynaeve

(EL «L'ESPERANTISTE»)

Vian ideon pri la aranĝo de internacia kongreso de esperantistoj mi trovas tute bona. Sed, por ke la kongreso donu al nia afero nemalutilon sed nur utilon, ĝi devas esti aranĝita laŭ la sekvantaj principoj:

1.^o Gi devas esti bone kaj zorge aranĝita, havi multe da partoprenantoj kaj havi la karakteron de granda, solena kaj imponanta *fiesto* de internacia frateco, por ke la gazetoj multe parolu pri ĝi kaj ke ĝi estu plena de entuziasmo kaj veku en la tuta mondo entuziasmon kaj deziron aliĝi al ni. Krom paroloj oni devas aranĝi komunajn kantojn en esperanto, eble eĉ un internacian ludon aŭ publikan konkurson; oni devas aranĝi en ia granda teatro prezentadon de dramo en esperanto. Oni devas antaŭe eksciti la interesigon de la tuta urbo, por ke al ĉiuj festoj de la kongreso venu grandega multo da gastoj neesperantistoj;—per unu vorto, ni devas fari grandan *impreson* kaj devigi la tuta mondon paroli pri la kongreso.

2.^o En la kongreso oni devas paroli pri organizado de nia afero, reciproka helpo en la batalado, pri rimedoj de propagando, pri kreado de granda kaj utila literaturo, k. t. p.; sed *nenion*, absolute *nenion* oni devas paroli pri *ŝanĝoj* aŭ *pli-ŝanĝoj*! Por ke nia lingvo atingu sian

Carta del Dr. Zamenhof

Dirigida al Sr. M. Seynaeve

(TRADUCIDA DE «L'ESPERANTISTE»)

Laidea de V. con respecto á la institución de un congreso internacional de esperantistas, yo la encuentro muy buena. Pero para que el Congreso no proporcione á nuestro asunto perjuicio, sino utilidad solamente, debe ser organizado bajo las siguientes bases:

1.^o Debe ser bien y cuidadosamente dispuesto, tener muchos congresistas y el carácter de grande, solemne é imponente *fiesta* de internacional fraternidad, para que la prensa extensamente se ocupe de él y resulte lleno de entusiasmo y despierte en el mundo entero el deseo de unirse á nosotros. Aparte de los discursos, deben prepararse cantos populares en esperanto; si es posible, hasta algún entretenimiento internacional ó certamen público; deben disponerse en algún gran teatro representaciones de un drama en esperanto. Con anterioridad debe también excitarse el interés de la ciudad donde se celebre, para que á todas las fiestas del Congreso acudan muchos forasteros no esperantistas;—en una palabra, debemos causar impresión fuerte y obligar á todo el mundo á que hable del Congreso.

2.^o En él se debe tratar de la organización de nuestro asunto, de la reciproca ayuda en la lucha, de los medios de propaganda, de la creación de una grande y útil literatura, etc.; pero nada, absolutamente nada debe tratarse de *cambios* ó *mejoras*! Para que nuestro idioma logre

celon kaj ne disfalu kiel Volapük, ĝi devas resti por ni absolute *netuŝebla*, tiel same kiel ĉiu alia lingvo, en kiu neniam persono ja kuraĝus proponi iajn reformojn, kvankam ĉiu el tiuj lingvoj estas multe malpli perfekta ol nia.

Nun al la demando pri Akademio. Jam tre longe mi pensas pri aranĝo de ia kons-tanta «Centra Komitato», kiu prezentus per si la plej altan aŭtoritaton en nia afero kaj kiu sola havus la rajton solvadi ĉiujn dubojn, kiuj aperas en nia afero. Sed la komitato devos decidi nur pri demandoj *dubaj*; fari iajn *ŝanĝojn* en la lingvo, la komitato *ne* havos la rajton. Kun la aranĝo de tia Centra Komitato oni devas esti tre singarda, por ne fari ian danĝeran paŝon; tial mi nun publike ankoraŭ neniam parolas pri tio ĉi, sed mi konsiliĝas pri ĝi private kun diversaj amikoj. Kiam la plano post matura pripenso montriĝos bona, tiam mi proponos al esperantistaj efektiviĝi tiun planon.

Sed ĉu Centra Komitato estos fondita aŭ ne—tiu ĉi demando tute ne devas maltrankviligi niajn amikojn. Ĉiaj paroloj pri reformoj aŭ plibonigoj tute ne devas vin maltrankviligi, ĉar ili havas nenian celon nek estontecon. Ĉu Centra Komitato estos fondita aŭ ne,—unu principo staras kaj devas stari tute forte, kaj la tuta mondo esperantista en la nuna tempo komprenas ĝin tre bone kaj certe batalos unuanime kontraŭ ĉiu ektaŭso de tiu principo; tiu ĉi principo estas: *simile al ĉiu alia lingvo, esperanto devas esti rigardata kiel lingvo finita kaj netuŝebla*. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povos nur tiam, kiam nia lingvo estos jam *oficiale akceptita* en la tuta mondo. Ĝis tiu tempo la *plej fundamenta* kondiĉo por nia progresado.

Mi parolas tion ĉi ne kiel aŭtoro de la lingvo, sed kiel *simple esperantisto*, kiu

su propoŝito y no se derrumbe como el Volapük, debe permanecer para nosotros absolutamente *intangible*, así como cualquier otra lengua en la cual, realmente, ninguna persona se atrevería á proponer reformas, aun cuando cualquiera de esas lenguas es mucho menos perfecta que la nuestra.

Vamos ahora á la pregunta respecto de la Academia. Hace ya mucho tiempo que pienso en la organización de algún «Comité Central» constante, que represente la más alta autoridad de nuestro asunto y que tenga el derecho de resolver todas las dudas que se presenten. Pero el Comité deberá decidir solamente con respecto á *dudas* preguntadas; para hacer *cambios* en la lengua, el Comité *no* tendrá atribuciones. Con la creación de este Comité Central debe tenerse mucha precaución, á fin de no dar algún paso peligroso; por eso yo ahora nada digo públicamente sobre esto; pero yo lo consultaré privadamente con diferentes amigos. Cuando el plan, después de madura reflexión se manifieste bueno, entonces propondré á los esperantistas que lo pongan en práctica.

Pero sea ó no fundado el Comité Central, esta cuestión no debe por completo intranquilizar á nuestros amigos; todo cuanto se diga referente á reformas ó mejoras, no debe alterar vuestra tranquilidad, porque ni van á ninguna parte, ni han de llegar á ser. Ora se funde, ora no, el Comité Central, hay un principio permanente que debe subsistir siempre firme. El mundo esperantista de hoy lo comprende muy bien y á no dudarlo luchará unido contra todo conato de su alteración; este principio es: *á semejanza de cualquier otra lengua, el esperanto debe ser mirado como lengua acabada é intangible*. Hablar sobre mejoras (si fuesen efectivamente necesarias) podremos, cuando nuestra lengua haya sido *oficialmente aceptada* en todo el mundo. *Hasta* entonces, la intangibilidad de nuestra lengua es la condición *fundamental* para nuestro progreso.

Digo esto, no como autor del idioma, sino como un *simple esperantista* que

ne deziras, ke nia afero disfalu, kiel la afero de Volapük (1).

Mia opinio ne estas sekreta. Se vi deziras, vi povas publikigi mian leteron.

Via,

L. ZAMENHOF.

«La Suno Hispana» konfirmas sian senkondiĉan submeton al la aŭtoritato, ankau netuŝebla, de nia kara majstro D.^{ro} Zamenhof, kaj faras uzon kun granda ĝojo el tiu ĉi favora okazo por sciigi al ĉiuj ke ĝi «neniam» okupos sin pri «reformoj» aŭ «plibonigoj», kies nuna diskuto alportas tre grandan malutilon al la triumfo de nia afero.

desea que el esperanto no tenga un fracaso como lo tuvo el Volapük (1).

Mi opinión no es secreta; puede V., si quiere, publicar mi carta.

De V.,

L. ZAMENHOF.

«La Suno Hispana» reitera su incondicional sumisión á la aŭtoridad, también intangible, de nuestro querido maestro, y aprovecha con gran regocijo esta ocasión propicia para manifestar á todos que «nunca» se ocupará de «reformas» ó «mejoras», cuya discusión actual ocasiona grandísimo perjuicio al triunfo de nuestra causa.

Bibliografio

Ni ricevis bonegan propagandan broŝureton publikigitan de *La Belga Sonorilo* sub la titolo: «L'Esperanto. Solution du problème de la langue internationale auxiliaire».

Ĝi enhavas 40 paĝojn tre lerte profitajn por raportoj al la leganto pri ĉio kio rilatas esperanton kaj povas interesi ĝian propagandon.

Ni kredas ke tiu broŝureto estos utiliga kaj kunhelpos potence la divastiĝon de esperanto en Belgio.

Kosto: 1 ekzemplero: 0 fr. 15; 10 ekz. 1 fr.; 20 ekz. 1 fr. 50; 50 ekz. 3 fr.; kaj 100 ekz. 5 fr.

Sin turnu al: Mr. L. Vandersleyen, 31 rue des Patriotes, á Bruxelles (Belgique).

Ni tre dankas al sinjoro H. Sentis,

(1) Kiel aŭtoro de la lingvo, mi pli ol ĉu alia volus, ke ĝi estu kiel eble plej perfekta, por mi la retenigado de plibonigoj estas pli malfacila ol por ĉu alia; kaj mi eĉ konfesas, ke kelkajn fojojn mi jam estis preta proponi al la esperantis la kelkajn malgrandajn plibonigojn; sed ĝustatempe mi ekmemoradis pri la granda danĝereco de tia paŝo kaj mi forĵetadis mian intencan.

Bibliografía

Hemos recibido un excelente folleto de propaganda publicado por *La Belga Sonorilo* con el título de «El Esperanto. Solución del problema de la lengua internacional auxiliar».

Contiene 40 páginas muy bien aprovechadas para dar al lector cuenta de todo lo que se refiere al esperanto y puede interesar á su propaganda.

Creemos que este folleto será de mucha utilidad y contribuirá poderosamente á la difusión del esperanto en Bélgica.

Precio: 1 ejemplar, 0,15 fr.; 10 ejemplares, 1 fr.; 20 ejemp., 1,50 fr.; 50 ejemplares, 3 fr., y 100 ejemp. 5 fr.

Dirigirse á Mr. L. Vandersleyen, 31 rue des Patriotes, á Bruxelles (Belgique).

Agradecemos mucho al Sr. H. Sentis,

(1) Como autor de la lengua, quisiera yo, más que nadie, que fuera ésta lo más perfecta posible; para mí la retención de las mejoras es más difícil que para cualquier otro; y hasta confieso que algunas veces he estado dispuesto á proponer á los esperantistas algunas, de poca importancia; pero al mismo tiempo se me ha ocurrido el gran peligro de tal paso y he abandonado mi propósito.

profesoro ĉe la Liceo el Grenoble (Francujo) pri la sendaĵo de broŝureto kiu enhavas tri belajn esperantajn poeziojn; «Alvoko de Montano», «Malgranda floreto» kaj «Kanto de Monta Pino» (kiuj provas ke esperante oni povas bonege versigi). Ni gratulas S.^{on} Sentis pro la brila monstro de lia poetkapablo.

Utilegan *Radikan Vortareton* esperante-hispane, publikigis en Valencia la lerta kaj entuziasma esperantisto R. P. Guinart. Ni tre rekomendas al la hispanaj esperantistoj tiun necesan libreton kies prezon ni esprimas en 66^a paĝo el tiu ĉi gazeta numero.

Kun afabla dediĉaĵo ni ricevis la unuan numeron (dum jaro 2.^o) de la Itala gazeto *L'Esperantista*, kiu antaŭen publikigos la Direktanta komitato por propagando de esperanto en tiu lando. Ni trovas ĝin kaj ĝiajn proponojn, lertaj kaj simpatiaj kaj ni al ĝi deziras a plej grandan sukceson. Oni abonas per 4 frankoj jare, ĉe Sro. Bagnulo, 4 Largo, Gesu é María, —Napoli.

Grupo esperantista de Murcia presigis belan broŝureton dediĉitan al la nelaĉebla Perua propagandanto D.^{ro} Villarreal. Gi estas titolita *Esperanto* kaj enhavas resumon de gramatiko kaj aliajn kuriozajn sciigojn. Estas oportuna kaj simpatia propaganda broŝureto kaj la laboro estas zorge elfarita ĉe Sro. Paul de Lengyel el Szekszard.

De longe oni bezonis tian broŝureto kaj la grupo esperantista Murcia, per sia inicieco, solvis la interesan problemon.

Ni konsilas al ĉiuj esperantistoj hispanaj ke ili rapidu akiri kiel eble plej multa nombro da ekzempleroj kaj dedieŭ sin al ilia disdonado inter sia amikaro kaj konatularo por ke ni baldaŭ vidu en Hispanujo esperanton alvenantan al tiu rapidprograsa stato kiun ĝi atingis en nia najbara respubliko.

profesor del Liceo de Grenoble (Francia), un librito que contiene tres bellas poesías: «Alvoko de Montano» (Llamamiento de la Montaña), «Malgranda floreto» (Pequeña florecilla) y «Kanto de Monta Pino» (Canto de un pino del monte), las cuales prueban que en Esperanto se puede versificar perfectamente. Felicitamos al señor Sentis por la brillante muestra de sus facultades poéticas.

El entendido y entusiasta esperantista Rdo. P. Guinart ha publicado en Valencia un utilísimo «Vocabulario de raíces», Esperanto-español. Recomendamos eficazmente a los esperantistas españoles tan necesario librito, cuyo precio expresamos en la página 66 de este número del periódico.

Con cariñosa dedicatoria hemos recibido el primer número del segundo año de la revista italiana *L'Esperantista*, la cual, en adelante, publicará el Comité directivo para la propaganda del Esperanto en aquel país. Apreciamos que ella y sus propósitos son discretos y simpáticos, y le deseamos gran éxito. Se hace el abono por 4 francos anuales en casa del señor Bagnulo, 4, Largo, Gesu é Maria, Napoli.

«El Grupo Esperantista de Murcia» ha hecho imprimir un bello folleto dedicado al incansable propagandista doctor Villarreal. Se titula «Esperanto», y contiene un resumen de la gramática y otras curiosas noticias. Es oportuno y simpático este librito, y el trabajo está cuidadosamente acabado en casa del señor Paul de Lengyel de Szekszard.

Hace ya mucho tiempo que se necesitaba un folleto semejante y el Grupo Esperantista de Murcia, con su iniciativa, ha resuelto el interesante problema.

Aconsejamos a todos los Esperantistas españoles que se apresuren a adquirir el mayor número posible de ejemplares de este útil folleto y se dediquen a distribuirlos entre sus amigos y conocidos para que veamos pronto el Esperanto en España en el mismo floreciente estado que ha alcanzado en nuestra vecina república.

La groto

Tie estas ĉiuj eblaj kaj neeblaj mirindaĵoj, faritaj de la akva gutado, dum ĝia multenjara laboro. Neniam iu sukcesos priskribi kion oni vidas tie. Necese estas vidi ĝin, necese estas ĝin senti.

Tiu kapturniga akvofalado, kiu per pluvo da perloj fermas la enirejon de la groto, solan truon, kiun malfermis la naturo por ke ĝi restu ĉiam netranspaŝebla, kvazaŭ ŝercante la homon, ĉar la naturo ne kredis ke li ŝercos tian truon traborante la monton;

tiu dubehela lumo, kiu timeme enpenetras kvazaŭ pentinta eltrovi belegaĵojn el faritajn por esti nevidataj;

tiuj ĉiuspece koloraj kontrastoj el herboj kaj muskoj kaj ĉiuformaj ŝtonegoj;

tiu kristala kaj diafana rivereto, kiu ekfluas el angulo de la groto al kiu ĝis nun ne alproksimiĝis la malĉasta homa lipo, sed nur la ĉasta beko de la kolombino, kiu en tiuj profundaĵoj trovis senriskan rifuĝejon kaj eternan ripozejon;

tiuj hederaj, ŝtoniĝintaj sur la muroj, kiaj formas bordajn ornamojn, kaj girdandojn, kaj punktojn kaj arabajn bordaĵojn;

tiuj grandaj, eĉ grandegaj masoj, de ĉiuj grandecoj kaj de ĉiuj formoj, kiuj pendas de la plafono, kaj estas subtenataj en la aero de nevideblaj ŝlosilantaj ŝtonoj, por konfuzi la plej sciencan arkitektiston;

tiuj delikategaj faritaĵoj kiuj etendas sin sur la muroj, kun arta konfuzo kaj kaprica sed harmonia kontrasto, por konfuzi la plej inspiratan belartiston;

tiu amaso da kolonoj, da kapituloj, da piramidoj, da piedestaloj, da subteniloj de ogivaj linioj, bizanciaj modeloj aŭ maldekaj formoj, ĉio intermiksita laŭ la plej terura senordeco de la plej perfekta arĥitekto;

tiu stalaktitoj kiuj per ama kaj centpaca konstanteco malsupreniras trovi la stalagmiton, kun kiu ili ĉirkaŭpreniĝos

La gruta

Allí están todos los portentos posibles é imposibles, realizados por la gota de agua en su labor de siglos. Nadie acertará jamás á explicar lo que allí se ve. Es necesario verlo, es necesario sentirlo.

Aquella vertiginosa cascada que en lluvia de perlas cierra la boca de la cueva, único paso que para no ser franqueado nunca abrió la naturaleza, como en burla del hombre, sin pensar que éste le burlaría á su vez taladrando la montaña;

aquella luz dudosa que penetra tímidamente, como arrepentida de descubrir bellezas que no se hicieron para ser vistas;

aquellos contrastes de colores de todas clases, de hierbas y musgos de todo color y de rocas de toda forma;

aquel arroyo transparente y cristalino que brota en un ángulo de la gruta, y al cual, hasta ahora, no se había acercado el labio impúdico del hombre, sólo el casto pico de la paloma que en aquellas profundidades hallaba seguro asilo y eterno reposo;

aquellas hiedras en los muros petrificadas que forman cenefas, y guirnaldas, y encajes, y bordados arabescos;

aquellas grandes y colosales masas de todos tamaños y de todas formas que cuelgan del techo, sostenidas en los aires por claves invisibles, para desesperación del más sabio arquitecto;

aquellas labores delicadísimas que se extienden por las paredes en artística confusión y en caprichoso, pero armónico contraste, para desesperación del más inspirado artista;

aquel hacinamiento de columnas, de capiteles, de pirámides, de zócalos y repisas, de ojivales líneas, de bizantinos modelos ó de barrocas formas, todo revuelto con el más espantoso desorden del orden más perfecto;

aquellas estalactitas que con amorosa y secular constancia descenden á buscar la stalagmita con que han de ceñirse y

kaj kunplektiĝos per edza kuniĝo, ĉe la eterna ombro de la nokto kiu regas en internajo de la tero;

tiuj strekoj kaj desegnoj kaj profiloj kaj konturoj kaj skizoj kiuj imitas ĉion, kio nomon havas en la tero, kion revas la iluziulo, kion vidas la poeto, aŭ imagas la belartista: gigantoj kiuj supreniras en la ĉielon, birdoj kun flugilegoj, kiuj traflugas la spacon, soifantaj Tantaloj, kiuj sin ĵetas trinki el la lago, legiooj da sorĉistinoj kiuj kuniĝas la sabaton, virgulinoj starantaj sur kolono, sin prezentantaj al la adoro de la kredantoj, centoj da fantomoj kiuj disŝiras la aeron, vestitaj per longaj tolaĵoj, floroj kaj fruktoj idealaj, transflugaj fiŝoj kun serafaj flugiloj, arboj intertropikaj kun homaj kapoj anstataŭ fruktoj kaj skvamaj serpentoj anstataŭ branĉoj, multepezaj mastodontoj de miriga grandeco, profiloj kaj objektoj nekonataj en la skulptarto, kolosaj idoloj kaj dioj kun rigidaj konturoj, kriptogamaj kreskaĵoj kaj bestoj antaŭaj je la superakvego, monstroj, malbelaj ŝajnigaĵoj fantomoj, teruraĵoj, sanktejoj, statuoj, idealaĵoj, fantazioj, ĉielaj kaj infernaj kaj teraj figuraĵoj;

jen ĉio kion oni vidas kaj ne povas esti priskribita, ĉar tie troviĝas ĉio kion skulptis Mikaelo-Anĝelo, kion revis Goja, kion Dante vidis kaj ĉio farita de tiu belartista nekonata, pli lerta ol Dante, Goja kaj Mikaelo-Anĝelo, simple nomata la akva guto, kiun helpas Dio kaj la tempo por labori kaj poluri siaj belajn faritaĵojn.

V Balaguer. (*La ŝtona monaĵejo.*)
Esperantigis: R. CODORNÍU.

enlazarne en unio nupcial a la eterna sombra de la noche que reina en las entrañas de la tierra;

aquellos trazos, y dibujos, y perfiles- y contornos, y diseños, y bocetos reme, dando todo lo que en la tierra tiene un nombre, todo lo que sueña el visionario, todo lo que ve el poeta ó imagina el artista: gigantes que escalan el cielo, aves de monstruosas alas que cruzan los espacios, tántalos sedientos que se arrojan á beber en el lago, legiones de brujas que se congregan para el sábado, vírgenes que de pie en un pilar se ofrecen á la adoración de los fieles, cohortes de fantasmas en luengos sudarios envueltos que rasgan el aire, flores y frutos ideales, peces volanderos con alas de serafines, árboles intertropicales con cabezas humanas por frutos y escamosas serpientes por ramas, pesados mastodontes de pasmosas dimensiones, perfiles desconocidos en el arte y objetos ignorados en la plástica, ídolos de formas colosales y dioses de tábidos contornos, plantas criptógamas y faunas antidiluvianas, monstruos, vestiglos, visiones, horrores, templos, estatuas ideales, fantasías, imágenes del cielo, del infierno y de la tierra;

Todo esto es lo que se ve y no puede describirse, que allí está todo, todo lo que esculpió Miguel Angel, todo lo que soñó Goya, todo lo que vió Dante, y todo realizado por ese artista desconocido, superior á Dante, á Goya y á Miguel Angel, que se llama sencillamente la gota de agua, y que cuenta con Dios y con el tiempo para trabajar y pulir sus obras inmortales.

V. BALAGUER.
(*El Monasterio de Piedra.*)

Malgranda floreto

Malsupre la florajn herbejojn lasinte,
De longe mi marŝas tra neĝaj krutaĵoj.
Mi haltu momente. Jen estas ŝtonega
Por mi ripozejo. Ho kiel mirinde!

En roko fendita,
Malgranda floreto
Elkreskis ŝirmita.

Una florecita

Dejando allá bajo los prados floridos
Yo lejos me marcho por nevadas cuestras
Me paro un momento. Aquí hay una piedra
Para mi descanso. ¡Oh cuán admirable!

De una hendida roca
Una florecilla
Crecía al amparo.

La fortoj naturaj por ĝi prilaboris;
Car, iom post iom, la vintraj neĝadoj,
En kavo tereron, de polvo faritan,
Enlasis; kaj tiam blavanta ventego

La semon alportis.
Malgranda floreto,
De nubo ci venis.

Sed kial ci tiel belete floradas?
Kaj kial ci punton folian etendas?
Cin nek papilio, nek kisis abelo;
Car tian altajon eĉ agloj ne flugas.

Al cia kroneto,
Malgranda floreto,
Nenia rigardo.

En tiu ĉi ŝtona senmova dezerto,
Nenio, krom ni du, vivadas kaj amas.
Mi cin unuhoran senvoĉan kunulon
Tutkore jam amas; kaj eble ci ĝojas.

Mi kiam foriros,
Malgranda floreto,
Ci sola restados!

H. SENTIS.

Fuerzas naturales en pro de ella hicieron:
Pues poquito á poco nevadas de invierno
En hueco la tierra, de polvo formada.
Dejaron; y entonces el soplo del viento

Llevó la semilla
Oh flor pequeñita,
Viniste del cielo.

¿Por qué de este modo tan linda floreces?
¿Por qué como encaje tus hojas extiendes?
A ti no ha besado mariposa ó abeja,
Porque á estas alturas ni el águila vuela

A tu coronilla
Oh flor pequeñita
Mirada ninguna

Aquí en este inmóvil desierto de piedra
Fuera de nosotros nadie vive y ama
Yo á ti, mudo amigo, desde hace una hora
Amo cordialmente. Tú tal vez te alegras.

Cuando yo me marche,
Oh flor pequeñita,
Te quedarás huérfana.

(Traducción del R. P. Guinart, esc.^o)

Sciigoj

Kun granda bedaŭro ni sciigas la morton de niaj karaj samideanoj. S.^o *Ivano Selezujov*, el *Tomsk*, (Rusujo) kaj S.^o *grafo Gastono de Maigret*, el *Epernay* (Francujo).

Ni partprenas en la kondolenco de iliaj familioj.

Anglujo.—Ni sciigis pri la ekzistado de la jenaj grupoj: Bournemouth, Brixton, Dublin, Dundee, Edinburgh, Glasgow, Huddersfield, Ilford, Keighley, Liverpool, London, Manchester, Newcastle, Plymouth, Portsmouth, Southamton, Surbiton kaj Tyneside. Bombay kaj Kolombo (insulo Ceylan) kaj Misida (insulo Malta).

Belgujo.—Gazetojn el Ganto, *Antwerpeno*, *Namurs-o*, *Dinant-o*, *Lovaino* kaj *Andeno*, enpresas favorajn artikolojn pri esperanto.

Wevelghemo.—La fervora esperantis-

Noticias

Con gran sentimiento damos noticia del fallecimiento de nuestros queridos colegas *Sres. Ivan Selezujov*, de *Tomsk* (Rusia) y *Sr. Conde Gaston de Maigret* de *Epernay* (Francia).

Tomamos parte en el sentimiento de sus familias.

Inglaterra.—Tenemos noticia de la existencia de los siguientes grupos: Bournemouth, Brixton, Dublin, Dundee, Edinburgh, Glasgow, Huddersfield, Ilford, Keighley, Liverpool, London, Manchester, Newcastle, Plymouth, Portsmouth, Southamton, Surbiton, y Tyneside. Bombay y Kolombo (isla de Ceylán), Misida (isla de Malta).

Bélgica.—Periódicos de Gante, Amberes, Namurs, Dinant, Lovaina y Andenne insertan favorables artículos sobre el Esperanto.

Wevelghem.—El fervoroso Esperan-

to S.^o Van de Putte comencis esperantan publikan kurson. Sijaj lernantoj estaskvardek kaj oni esperas ilin plimultigis.

Brujo.—En tiu ĉi urbo ĵus fondiĝis grupo dank'al klopodo de senlacebla sinjoro Wyttercky.

Bulgarujo.—En tiu ĉi lando eksterordinare plimultiĝas la esperantistoj danko al senĉesalaboro de grupoj el Burgazo, Filipoplo, Kazaŭliko, Kjustadilo, Lo, Plevno, Rusĉuko, Silistro, Sofio, Slivno, Starazagozo, Svistovo, Tirnovo, Troyano kaj aliajn.

Provadio.—La 27^{an} de lasta Decembro, estis fundata grupo nomita «Stleton».

Uzatca.—Sor. Th. Culef, komencis esperantan kurson.

Sofio.—La universitato de tiu ĉi urbo malfermis siajn pordojn al esperanto. Oni faras du kursojn je nia kara lingvo, direktitaj de la lertaj esperantistoj Sinjoro Bradinov kaj Jordanov de la klubo «Aurora».

Varno.—Sinj. G. Atanasov faras esperantan kurson en popola lernejo «S. Metodivo» el tiu grava urbo kaj oni esperas ke frue fondiĝos grupo.

Cilio.—Ni ricevis la duan numeron de *Cilio Esperantista*; ĝi raportas pri la bonakcepto kiun ricevis la unua numero kaj enpresas tradukon hispanan de la unua leciono de «Esperanto en dek lecionoj de sinj. Cart.»

Francujo.—La ministro de la ŝiparo kiel sia milita kolego, donis permeson al la oficiroj de'l diversajn korpusoj de la maristaro, por anĝi al la esperantistaro kaj labori pro la divastigado de nia kara lingvo.

Novaj grupoj kreiĝis en Saint Quintin, Eu, Troyes, Clermont-Ferrand kaj Saint Etienne.

Amiens.—Oni elektis la estraron por 1904 de la grupo. Prezidanto, Sinj. Tassencourt. Vicprezidanto, Sinj. J. Thomas. Sekretario helpanta, Sinj. Lamy. Kasisto, Sinj. Herbert. Bibliotekisto, Sinj. Charlet. Konsilaroj: Sinj. grafo de Dampierre,

tista Sr. Van de Putte ha comenzado un curso público de Esperanto. Sus discípulos son cuarenta y se cree que aumentarán.

Brujas.—En esta Ciudad acaba de fundarse un grupo, gracias á los trabajos del incansable Sr. Wyttercky.

Bulgaria.—En este país se aumentan extraordinariamente los esperantistas á causa de la incesante labor de los grupos de Burgaz, Filipoplo, Kazaŭliko, Kjnstadil, Lo, Plevno, Rusĉuko, Silistro, Sofia, Slivno, Starazagoza, Svistov, Tirnovo, Troyan y otros.

Provadio.—El 27 de Diciembre último se fundó un grupo llamado «Stleton».

Uzatca.—El Sr. T. H. Culef ha comenzado un curso de Esperanto.

Sofia.—La Universidad de esta capital ha abierto sus puertas al Esperanto. Se tienen dos cursos de nuestro querido idioma, dirigidos por los hábiles esperantistas Sres. Bradinov y Jordanov del club «Aurora»:

Varna.—El Sr. G. Atanasov da un curso de Esperanto en la popular escuela de «S. Metodivo» de esta gran ciudad y se espera que en breve se funde un grupo.

Chile.—Hemos recibido el segundo número *Cilio Esperantista*. Da cuenta de la buena acogida que ha recibido el primer número é inserta la traducción española de la primera lección del «Esperanto en diez lecciones del Sr. Cart.»

Francia.—El ministro de Marina, como su compañero el de la guerra, ha dado permiso á los oficiales de los varios cuerpos de la Armada, para que tomen parte en el movimiento Esperantista y propaguen nuestra querida lengua.

Se han creado nuevos grupos en Saint Quintin, Eu, Troyes, Clermont-Ferrand y Saint Etienne.

Amiens.—Ha sido elegida la nueva junta directiva del grupo para 1904. Presidente, Sr. Tassencourt; Vicepresidente, Sr. Thomas; Secretario, señor Delfour; Secretario auxiliar, Sr. Jamy; Cajero, Sr. Herbert; Bibliotecario, señor

Florissonne, Monsset O'Brunier, Michel kaj Boyarel; Sekretario Sinj Delfour.

Besancon.—Sinj. M. Saint Lonp faris elokventan paroladon pri Esperanto en militista Societo de Besancon la 22.^a de lasta Januaro, Poste li disdonis presitan folion pri tio, kiu li havis bonecon sendi nin kaj ni tre dankas.

Tiu propaganda folio esprimas ke hodiaŭ estas esperantistoj en ĉiujn landoj kaj ke esperanto estas la ilo praktika de la internaciaj rilatoj, facile akirebla pro ĝia simpleco.

Ankaŭ diras ke pli ol kvardek grupoj esperantistaj estas fonditaj en Francujo, kaj en Parizo sole, oni faras pli ol tridek kursojn de esperanto.

Fine li rilatas pri la progresado de nia afero en Alĝerio, kion ni sciigis en nia lasta numero.

Calais.—Krom la kursoj farataj de Sinj. Louguet kaj Perrin, kapitano Demogne, prezidanto de la grupo malfermis kurson por virinoj en la *Paça Fuĝejo*.

Meursault (Cote d'or).—Sinj. Ecoffet malfermis kurson kaj li esperas tie formi esperantan grupon.

Rouen.—Sinj. Andreo Gehet donis nian unuan esperantan kurson en tiu ĉi urbo. La ĉeestintoj estis ĉirkaŭe ducent.

Saumur.—Fraŭlino A. Roux malfermis kurson por la instruistinoj kaj edukotinoj de la Junulina Kolegio el tiu ĉi urbo.

Suresnes.—Oni malfermis kiel en la antaŭaj esperantan kurson ĉe «Asociation Polytechnique».

Germanujo.—Oni fondis definitivitan societon sub la nomo «Esperantisten-Gruppe», en Berlino.

Meksikujo.—Komencas movado esperantista en tiu lando. La ĵurnalo *El Misionero Mejicano* enpresis pri tio belan artikolon en esperanta kaj hispana lingvo kaj en Verakruza provinco oni kreis provinca komitato, kies adreso estas sinjoro

Charlet; Vocales, Sres. Conde de Dampierre, Florisoone, Monseet, O'Brunier, Michel y Boyard.

Besancon.—El Sr. M. Saint, Loup, prononció un discurso en una sociedad militar de Besancon el 22 de Enero último. Después repartió una hoja impresa referente á aquél, la cual ha tenido la bondad, que mucho le agradecemos, de mandarnos.

Esta hoja de propaganda demuestra que hoy hay esperantistas en todos los países y que el Esperanto es el instrumento práctico para las relaciones internacionales, fácil de poseer por su sencillez.

También dice que más de cuarenta grupos esperantistas hay fundados en Francia y en París solamente, se dan más de treinta cursos de Esperanto.

Finalmente se refiere al progreso de nuestro asunto en Argelia, lo cual nosotros dimos á conocer en nuestro número último.

Calais.—Además de los cursos que dan los Sres. Louguet y Perrin, el Capitán Demogue, Vicepresidente del grupo, ha empezado un curso para señoras en la *Paça Fuĝejo* (local del juzgado de Paz).

Meursault (Cote d'or).—El señor Ecoffet ha empezado un curso y espera formar allí un grupo esperantista.

Rouen.—El Sr. Andrés Gehet dió su primer curso de Esperanto en este país. Los asistentes fueron unos doscientos.

Saumur.—La Srta. A. Roux empezó un curso para las institutrices y educandas de el Colegio de Señoritas de esta ciudad.

Suresnes.—Se ha empezado un curso y se intenta crear un grupo.

Alemania.—En Berlín se ha fundado una definitiva Sociedad, bajo el nombre de «Esperantisten Gruppe».

Méjico.—Empieza el movimiento esperantista en aquel país. El diario *El Misionero Mejicano* inserta un bello artículo en Esperanto y Castellano y en Veracruz se ha formado un comité ejecutivo, cuya dirección es: Sr. A. Morín—Nogales—

A. Morin—Nogales—Veracruz—Méjico. Tiu ĉi sinjoro estas prezidanto, vicprezidanto, Sinj. A. Lamik; sek., doktoro Vargas kaj konsilaroj, sinjoroj Avalos, Blanco kaj Saldaña.

La ĉiusemana gazeto *El Reproductor*, el kantono de Orizaba, faris entuziasman raporton de la bela propaganda parolado farita de sinjoro doktoro Ambrosio Vargas en tiu urbo.

Peruo.—Esperantajn kursojn estas farataj en Limo, Ciklajo kaj Huamaĉuko, kaj Sinj. Osorio profesoro ĉe la universitato de Arekipo, faros baldaŭ paroladen en tiu ĉi urbo, kie jam estas aliaj ajn esperantistoj.

Hispanujo. *Barcelona.*—*La Vanguardia*, unu el la plej ĉefaj ĵurnaloj de tiu urbo, enpresigis, belegan artikolon propagandan verkitan de mia kara amiko, sinjoro P. Fruictier, ĉefredaktoro de *Lingvo Internacia*.

En ĝi oni respondis per klaraj argumentoj kelkajn konsiderajn en la nomita gazeto Kontraŭ lingvo tutmonda.

La artikolo de S.^o Fruictier estas tiel interesa ke ni multe bedaŭras ke ni ne povas pro manko de loko, ĝin transkribi plene; sed almenaŭ ni havas la plezuron prezential la legantoj ĝiajn lastajn liniojn:

«Por mi valoras sole la faktoj, kaj la »faktoj diras al mi:

»Esperanto estas aprobita de Tolstoj kaj Max Müller, de Henry Philipps kaj »Claes Adelskold;

»Esperanto estas uzata de centoj da »miloj da homoj ĉiulandaj;

»Esperanto havas dek sep revuojn, »ducent kvindek volumojn, cent kvindek »societojn propagandajn;

»Esperanto estas oficiale instruata en »diversaj gimnazioj, kiel en Semur, en »Beaune, en la problindulaj institutoj de »Stokolmo kaj Parizo;

»Esperanto ĉe havas *Sciencan Revuon* »gvidatan en Francujo de Prof. Bou- »chard, d'Arsonval kaj generalo Sebert, »membroj de la Instituto, en Anglujo de »Prof. Ramsay, membro de Royal Society

Veracruz—Méjico. Este señor es Presidente: Vicepresidente, Sr. H. Lamick; Secretario, Doctor Vargas, y Vocales, Sres. Avalos, Blanco y Saldaña.

El periódico semanal *El Reproductor* del Cantón de Orizaba, hace una entusiasta descripción del bello discurso de propaganda hecho en aquella ciudad por el Sr. Dr. D. Ambrosio Vargas.

Perú.—Se dan cursos de Esperanto en Lima, Chiclayo y Huamachuco y el Sr. Osorio profesor de la Universidad de Arequipa dará pronto una conferencia en esta ciudad, donde ya hay algunos otros esperantistas.

España.—*Barcelona.*—*La Vanguardia*, uno de los diarios más importantes de esta ciudad, insertó un bellissimo artículo de propaganda escrito por nuestro querido amigo, el Sr. P. Fruictier, redactor principal de *Lingvo Internacia*.

En él se contestó con una clara argumentación á algunas consideraciones hechas en el mismo diario por el Sr. Juan Buscón contra la lengua universal.

El artículo del Sr. Fruictier es tan interesante, que sentimos en extremo no poder transcribirlo íntegro por falta de espacio; pero al menos tenemos el gusto de presentar á los lectores sus últimas líneas:

«Para mí lo que valen son los hechos, »y los hechos me dicen:

«El Esperanto está aprobado por »Tolstoj y Max Müller, por Henry Phi- »lipps y Claes Adelskold;

«El Esperanto se usa por centenares de »miles de hombres de todos los países;

«El Esperanto tiene diez y siete re- »vistas, doscientas cincuenta obras y »ciento cincuenta sociedades de propa- »ganda.»

«El Esperanto se enseña oficialmente »en algunos centros de enseñanza supe- »rior, como Semur, Beaune y en los insti- »tutos para ciegos de Stokholmo y París.

»El Esperanto tiene ya una *Revista* »*Científica*, dirigida en Francia por los »profesores Bouchard, d' Arsonval y Ge- »neral Sebert, miembros del Instituto; »en Inglaterra por el profesor Ramsay,

»kaj de W. Stead, direktoro de *Review of Reviews*;
 »en Belgujo de Prof. Massau
 »membro de la *Académie Royale de Belgique* ne kalkulante homojn, kiel profesoroj Duclaux, Brouardel, Méray, Lépine, Haller, Poincaré, Van der Waals, Tilly du Bois, Villareal, Ostwald, Hübner, Vladislaviev, Rešetin, Ostrovsky, Koracer, Bálint, Gabor, coronel Rénard, Benoit, Guillaume, Goriel, Richet, Broca, Wravrinisky, k. c.

»Kial vi volas, ke iel atingu mian konvinkon la opinio de ilia Sinjora Moŝto
 »Buscón kaj Spiroberg? — *Doktoro P. Fruictier*, el Parizo.»

Murcio.—*El Diario Murciano* (14.^{an} Januaro) enpresigas bonegan hispanan tradukon de rakonto publikigita en la lasta numero de *Lingvo Internacia* sub titolo «Tri blindulinoj».

La Verdad, ankaŭ Murcia ĵurnalo, sin okupas ofte kaj korege pri esperanto: ĝia propagando estas profitodona kaj ni gratulas kaj dankegas ĝin la helpon kiun ĝi eldonas.

Tarraso.—*Revuo Piedad y Letras* sciigis nin ke en la Skoloj Piaj de Tarraso okazis la 25ⁿ de Januaro lasta solena kunveno, aranĝita de la juna skolioj lernantoj, en honoro de la ĉefpastro, kiu sian nomfeston faris. Tie inter aliaj diversaj verkoj oni diris tri esperantajn paroladojn kiuj ĉarmis la tutan kunvenon, kaj estis aŭditaj kun multa plezuro. Ne mirinde, ĉar nia afero tian entuziasmon ekvekis ĉe la estontaj Skolopiaj lernejoj, ke oni aŭdas ilin interparoli esperante. Ja Skoloj Piaj estas la espero de Esperanto en Hispanujo.

»miembro de la *Royal Society* y W. Stead, director de la *Review of Reviews*;
 »en Belgica por el profesor Massau,
 »miembro de la *Académie Royale de Belgique*; todo esto sin contar con eminencias como los profesores Duclaux, Bronnardel, Méray, Sepine, Haller, Poincaré,
 »Van der Waals, Tilly du Bois, Villareal, Ostwald, Hübner, Vladislaviev,
 »Rešetin, Ostrovsky, Koracer, Bálint, Gabor, Coronel Rénard, Benoit, Guillaume, Goriel, Richet, Broca, Wravrinisky, etcétera, etc.

«¿Cómo quieren ustedes que llegue a convencerme la opinión de los señores Buscón y Spiroberg?

Murcia.—*El Diario Murciano* (14 Enero) inserta una excelente traducción española del cuento publicado en el último número de *Lingvo Internacia* con el título de «Tres ciegas».

La Verdad, también diario de Murcia, se ocupa con frecuencia y cariño del esperanto. Su propaganda es provechosa y nosotros le felicitamos y le agradecemos muchísimo el auxilio que nos presta.

Tarrasa.—La revista *Piedad y Letras* nos ha enterado de que en las Escuelas Pías de Tarrasa tuvo lugar el 25 del pasado Enero una solemne reunión, organizada por los jóvenes escolapios que estudian, en honor del padre rector que celebraba su fiesta onomástica. Allí, entre otros diferentes trabajos, se pronunciaron tres discursos en esperanto que encantaron a todos los reunidos y fueron oídos con mucho gusto. Y no es de admirar, porque nuestro asunto tal entusiasmo ha despertado entre los futuros maestros escolapios, que se les oye hablarse en esperanto. Realmente la Escuela Pía es la esperanza del Esperanto en España.

Filatelio

(El Londona ĵurnalo «The Daily Chronicle» 14.^a Januaro 1904.)

La firmo Puttick kaj Simpson havis hieraŭ en sia publika vendo unu el la

Filatelia

Del diario de Londres «The Daily Chronicle» 14 Enero 1904:

«La casa Puttick, Sumpson y compañía tenía ayer a la venta pública uno de

plej multekostaj poŝmarkoj de la mondo tre belan ekzempleron de 1'20 pencoj de «Maurico», bluan, neuzitan de 1847^a, je kiu oni nur konas 4-5 similajn: ĝi estis eltrovata antaŭ nelonge en malgranda kolekto farita de Sro. Jakobo Bonarkiamli estis knaba studento en Hampstead dum jaro 1864. La posedanto ne havis ideon ian pri ĝia valoro, ĝis kiam amikino, kiu kolektadas poŝmarkojn, ekvidis ĝin. La aliaj markoj, plimalpli defektitaj, havis malgrandan meriton, sed la dirita marko troviĝis en belega stato. En la venda ĝi atingis la prezon da 1450 libroj da sterlingaj, (fr. 36,250) kiu estas multe pli granda ol la plej alta prezo ĝis nun pagata en publika vendo por unu poŝmarko. Oni diris en la vendosalono ke ĝi estas eĉetita por la kolekto de Lia Moŝto Princo Galesa kiu, ni kredas, havas la plej mult valoran el ĉiuj privataj kolektomarkoj.

En la filatelio historio havas apartan ĉapitron la markoj unu pencaj, oranĝa, kaj du pencaj, blua, de «Maurico», 1847. Antaŭ kelkaj jaroj vendiĝis, private, du paroj el la du markoj por la prezoj £. 1.600 kaj £. 1.900, ĉar estas konataj nur 8-9 paroj da ili. La paro de Tapling en la Muzeo Britana estis taksata antaŭ kelkaj jaroj por 600 libroj kaj Sro. Avery, fama kolektisto en Birmingham, pagis laŭ oni diras ĉirkaŭ £. 800 por la paro kiun li posedas.—*N. M.*—*esperantigis.*

los sellos de más valor del mundo, bellissimo ejemplar de 1'20 peniques de «Mauricio», azul, no usado, del año 1847, del cual solamente se conocen cuatro ó cinco similares. Fué encontrado no ha mucho en una pequeña colección que formó el Sr. Jacobo Bonar cuando de muchacho era estudiante en Hampstead durante el año 1884. El poseedor no tenía ninguna idea de su valor hasta que una amiga coleccionista lo vió. Los otros sellos, más ó menos defectuosos, tenían poco mérito; pero el sello en cuestión se encontraba en muy buen estado. En la venta alcanzó el precio de 1.450 libras esterlinas (francos 36.250), que es mucho mayor que el precio más alto hasta ahora pagado en subasta por un sello. Se dijo en el salón que fué comprado para la colección de S. A. el príncipe de Gales, quien, según creemos, tiene la colección de más valor entre todas las particulares.

En la historia filatélica tienen especial capítulo los sellos de un penique naranja y de dos peniques azul, de «Mauricio» 1847. Hace algunos años se vendieron privadamente dos pares de los dos sellos por 1.600 £ y 1.900 £, porque se conocían sólo ocho ó nueve pares de ellos. El par de Tapling, en el Museo Británico, fué valorado hace algunos años por 600 libras, y el Sr. Avery, famoso coleccionista de Birmingham, pagó, según se dice, 800 por el par que posee.

Amuzajoj

I. La unua, la dua, la tria, la kvara kaj la kvina silabo de la vorto estas tuto kaj la tuto ne estas tuto ĉu kio estas?

II. Oni metu literon sur ĉiun punkton kaj oni legu vertikale kaj horizontale la jenajn vortojn.

- konsonantan literon
- • • adverbon
- • • • • flornomon
- • • • adjektivan sukfikson
- vokalan literon

III

L g I

Solvoj.—En la proksima numero.

A. S. B.

Korespondada fako de "La Suno Hispana,"

SINJOROJ:

- Ĵ. D. Silistra (Bulgarujo).*—Ni ricevis vian vizitkarteton. Dankon.
- Ĵ. D. St. Etienne (Francujo).*—Mi oferis en I de la E, se eble, plenumi kion ajn deziron, el kiu ajn esperantisto, sed mi tute ne povas dediĉi min al interŝanĝo de leterojn aŭ poŝtkartojn, pro manko da tempo.—Por komandi en Hispanujo komercan ŝipon oni bezonas esti mara kapitano, kaj por komandi fiŝkaptŝipon esti nur ekzaminita kaj aprobita por fiŝkaptmaŝtro—Hodiaŭ mi jam ne ŝipveturas. Por vi perfektigi en lingvo hispana, helpus vin tiu ĉi gazeto.
- A. M. Berlino.*—Mi sendis al vi, senpage, provan numeron.
- P. D. Moskovo (Rusujo).*—Mi sendis vin provan numeron laŭ via peto. Mi akceptas poŝtmarkojn por abonpago.—Dankon pro via sukcesa deziro pri nia gazeto.
- G. K. C. Peterburgo.*—Plezure mi sendis al vi lastan numeron de la gazeto. Kaj plezurege mi sciis vian sciigon pri vi koni hispanan lingvon kaj nian urbon.
- A. C. Alĝero.*—Vidu enpresitan vian anoncon. Ricevu miajn gratulaĵojn pro via laboro kaj pro viaj triunfoj.
- M. L. Vladivostoko.*—Orienta Azio. El via estimata 13-12-1903 mi prenis unu paperan rublon kaj 28 kopekojn en rusaj poŝtmarkoj por abono de S. E. V. al L. S. H. dua 1904.—Dankon.—Enmetita en Januaro numero, mi sendis al vi kvitancon.
- V. G. Merithyr (Anglujo).*—A consecuencia de su apreciada postal, visité al Sr. L., le llevé el recibo y me dió las pesetas. Gracias.
- A. M. R. Fuente-Grande (Hispanujo).*—Mi ricevis 2,60 pesetojn kun via estimata letero.—Dankon.—Mi ne forgesas vian deziron pri vortaro Hisp. Esp.
- A. F. Alĝero.*—Mi plenumis vian deziron. En nia gazeto vi vidos kiamaniere vi povos pagi.—Dankon.
- R. G. Ponce (Puerto Rico).*—Mi ricevis la dolaron.—Dankon.—Mi sendis al vi en paketo garantiita numerojn 1.^a al 4.^a de L. S. H., *Elementojn* de P. Guinart, kalkulon kaj kvitancon.
- A. M. Nogales (Meksikujo).*—Vi estas servita pri via deziro. Mi respondis al vi per poŝtkarto pri via propono.
- L'Esperantista. Riolutatq (Italujo).*—Kara kolego: ni plezure interŝanĝas kun vi nian gazeton; ni sendos al vi ĉiujn numerojn. Se unun aŭ kelkajn el ili vi ne ricevis, sciigu al mi, mi petas, kaj mi ilin tuj resendos al vi.
- G. K. D. Saratov (Rusujo).*—Mi ricevis el vi unu rublon. Mi sendas al vi L. S. H. de 1.^a Januaro. Dankon.
- L. S. Dijono (Francujo).*—Mi tute ne havas tempon por okupi min pri ŝanĝi amuza korespondado, sed vidu anoncon pri via afero.
- R. B. St. Claude (Francujo).*—Mi ricevis 3 Fr. je poŝtmarkoj, kaj rakonto.—Dankon,—Mi korespondos, tuje mi povos, al vian estimatan leteron. Mi sendis al vi, n.^o 1.^a, 2.^a, 3.^a, kaj 4.^a, kvitancon kaj uzitajn poŝtmarkojn.

C. D. Gaud (Belgujo).—Mi plezure plenumas vian deziron, sendante al vi tiun ĉi numeron de la gazeto.

G. O. Plovdiv (Bulgarujo).—Mi sciigos vian peton al nia hispanaj samideanoj kaj se oni povas fari vian deziratan kolektadon, mi tuj kaj plezure ĝin sendos al vi.

R. D. Tendaro de St. Medard (Francujo).—Mi sendas al vi tiun ĉi numeron de L. S. H, kaj plezure plenumas vian deziron.

Kore salutas Vin,

A. J. L.

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11.—Valencia

Sinjoro Ludoviko Schlafflang. 1 Gambetta. Dijono (Côte d'or.) Francujo—Deziras korespondado kun hispanaj geesperantistoj per ilustritaj poŝtkartoj. Li ĝin sendus kun vidaĵoj el Parizo kaj el Dijono kontraŭ poŝtkartoj ilustritaj je hispanaj aŭ artaj vidaĵoj.

Avizo grava por turistoj

La grupo esperantista de Alĝero kaj de la Norda Afriko intencas organizi karavanon por ĉirkaŭe tridek ĉiulandaj turistoj. Tiu karavano vizitus plej internajn lokojn kaj pejzaĝojn en Alĝerio kaj estus per ĝia sola prospero la plej bona pruvo de la facila interparolableco de esperanto inter personoj de diverslingvaj landoj. La karavano okazus ĉirkaŭe la monaton majon kaj kostus, kun mara transveturo (per Marseille) de 500 ĝis 600 frankoj laŭ klaso de la mara vojaĝo.

Detalaj sciigoj estos sendataj laŭ peto. Kunigu 50 centimojn per poŝtmarkoj por la respondo.

Tre neprokrasteble, vi skribu, 17 *Bulvardo Gambetta, Alĝero* al sinjoro *A. Capé*.

Legu en la revuo "Lingvo Internacia,"

Skizon pri **EVOLUCIO DE L'KOMERCADO DE LA MONDO** *kompate kun sciencaj eltrovoj dum XIX.^a centjaro.*

Raporton de esplora komisiono de la Liona grupo esperantista pri **NUNA STATO DE ESPERANTO EN LA MONDO.**

Kaj diversajn artikolojn

48 PAGOJ

Jara abono.....	4 frankoj
Kun literatura aldono...	6,50 fr.
Prova 3 monata abono...	1,25 fr.

27, Boulevard Arago.—PARIS

Kaj ĉe administranto de LA SUNO HISPANA.